

Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

31 (3-4/2000) LEA/G
MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio per germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete
inkluzivas la organon
de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE) **La Socialisto**

Saluton ASLE-anoj!

Membroj kaj simpatiantoj de LEA/G tre ĝojas, ke vi decidis aboni nian organon *Magazino*. La redakcio en Berlin jam rezervis minimume tri paĝojn por vi. ASLE, do, povas publiki tute libere, konsiderante la ideon pri la Internacia Lingvo Esperanto, informojn, komunikojn, tekstojn, kritikojn ĉu Esperante ĉu germanlingve el la ASLE-movado kaj/aŭ pri aliaj temoj.

La redakcio (Gary Mickle, Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin; retadreso: gary@germany.net kaj TTT-adreso: <http://home.germany.net/101/121591/index.html>) ĉiam tre volonte akceptas tekstojn ĉu de la ASLE-estraro ĉu el la membraro.

Magazino aperas ĉiam kvaronjare. La redaktifino varias. Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ eĉ rifuzi alsendaĵojn.

Ni deziras al vi plezuron, kiam vi legas la revuon *Magazino*.

Mitglieder und Sympathisanten des Freien Esperanto-Bundes freuen sich sehr, dass ASLE-Mitglieder entscheiden, das Bundesorgan Magazino zu abonnieren. Die Redaktion in Berlin reservierte bereits mindestens drei Seiten für Informationen, Berichte, Aktivitäten, zur Internationalen Sprache Esperanto und anderen Themen, auch Kritik. Die Texte können in Esperanto und auch in der deutschen Sprache geschrieben sein. Es sollte dabei die Grundlagen-Idee der Sprache berücksichtigt werden.

Magazino erscheint jeweils in den Jahresquartalen. Der Redaktionschluss variiert. Die Autoren verantworten selbst den Inhalt ihrer Artikel; die Redaktion hat aber das Recht, Texte zu kürzen und sogar abzulehnen. Wir wünschen viel Vergnügen beim Lesen im Magazino.

AS

Korespondopetoj

Ryszard STEMPIEN

Str. Csklodowskiej 9

PL-59-970 Zawidow

nask. 1953

teknikisto

lingvoj: Eo, germana, pola

ŝatas naturon, sporton, kolektadon de

bildkartoj kaj poŝtmarkoj, turismon,

naturismon

preferas korespondi kun virinoj

Jan SKIBA

skr. poczt. 19

PL-44-217 Rybnik-17

nask. 1952

ankaŭ edzino Tonio parolas Esperanton

lingvoj: Eo, pola

ŝatas vojaĝi, kulturojn naciajn, religiojn kaj kuirarton; du filoj

preferas korespondi kun virinoj

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:

Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj

regionoj (LEA/G)/ Freier Esperanto-Bund für

deutschsprachige Gebiete (LEA/G)

Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch,

(Tel. +Fax: (07802) 90 336)

LEA/G per SAT en TTT:

<http://www.multimania.com/satesperanto/>

Redakcio / Redaktion:

Gary Mickle (GM), Brüsseler Str. 6,

DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47),

retadreso / E-mail-Adresse:

101.121591@germany.net

Hans Rodewig (HR), Stammestr. 86D,

DE-30459 Hannover

Albert Stephan (AFS), ĉe la supre indikita

adreso de LEA/G / unter der oben ange-

gebenen LEA/G-Adresse

Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la

redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi

alsendaĵojn.

Redaktofino: varias (kontakto GM sub la

supre indikita adreso)

MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint

vier Mal jährlich;

abonprezo / Bezugspreis 15,- DM

La membrkotizo entenas liveradon de la

bulteno.

LEA/G-konto: Jiri Proskovec

n-ro 9168 434 Postbank Essen

(BLZ 360 100 43)

Represo de materialo permesita, se la fonto

estas indikita.

Nova formato por la
Magazino?Kunredaktoro k-do Albert Stephan
proponas:

«Mi ŝatus kaj rekomendas fari nian organon en la sama formato kiel tiu de SAT-Amikaro, kiel la iama *La Libera Esperantisto*. Mi rekomendas ankaŭ traduki certajn tekstojn en la germanan lingvon [...] La proponita formato estas laŭ DIN A4, la volumo estu inter 8 kaj 12 paĝoj (nuntempe formato DIN A5 – 24 paĝoj).

Aldone mia propono. Ĉar la titolo estas verdkolora mi estos preta ĉiam prepari la titolpaĝon 250-foje per mia komputilo. [...] Mi skribis la unuan A en MAGAZINO per @ [...]

Li prezentis je la sama okazo novan titolkapon, kiun ni reproduktas ĉi-sube, tamen sen la kromaj titolindikoj, kiuj troviĝus rekte sub la titolkapo.

Kiu el la legantoj havas opinion pri tia eventuala ŝanĝo?

GM



MAGAZINO

Kiun evoludirekton anticipi por LEA/G, aliaj LEA-oj kaj SAT? La problemaron de LEA/G ni ne fintraktis, sed almenaŭ ektuŝis en kelkaj pasintaj numeroj. Sed vere respondi la demandon ne eblas sen analizi la evolutendencojn en la Esperanto-komunumo kiel tuto kaj kredeble ne sen rigardo al la informaciteknika revolucio. (Rigardu tiukonekse ankaŭ la rubrikon pri la nova dissendolisto «LEA-G» sur p. 27.)

Kien Esperanto-asocioj?

de Gary Mickle

LEA/G kaj ankaŭ aliaj Esperanto-asocioj rigardas senhelpaj sian membroperdon, registras ĝian amplekson kaj de tempo al tempo laŭte pensas pri intensigo de varbado kaj aliaj strategioj por inversigi la evoluon. Ĉu ekzistas – realismaj – tiaj strategioj? Laŭ mi ne eblas ekregi la iradon de la historio. Jen du (certe ne la solaj) kialoj:

- La iompostioma **falo de la t.n. «finvenkismo»**: Intertempe multaj homoj, precipe la avidataj junaj, lernas Esperanton ne pro la imago, ke ĝi iam estos «la» monda interlingvo, sed pro la persona utilo, kiun ili esperas ĉerpi el ĝi, dum en la ekkrepuskanta epoko Esperanto-asocio konceptis sin kiel parton de movado en la vera senco: socia movado por tutmondigi Esperanton. Per aliĝo al asocio nova esperantisto povis fortikigi la «batalantan movadon». Tio ne estas valida argumento por novtipa esperantisto.
- **Interreto**: Grava kialo por aliĝi al asocio ĉiam estis ĝia revuo. Novuloj bezonis gazetojn kaj pro la lingva ekzercado kaj por ekorientiĝi en la Esperanto-komunumo. Verŝajne la plimulto de Esperantaj gazetoj estas asociaj organoj. Asocioj sen organo praktike ne ekzistas. Hodiaŭ estas alie: ĉiutage kreskanta nombro de homoj povas ekzerci legadon, orientiĝi pri la Esperanto-komunumo kaj ĉerpi la plej aktualajn informojn pri ĝi multe pli lerte kaj malmultekoste per vizitado de retdiskutejoj kaj TTT-ejoj, el la

interreta eldono de gazetoj, ol per aliĝo al kelkaj tradiciaj asocioj.

Jam tiuj du faktoroj malversajnis la kreskadon eĉ de la plej dinamikaj kaj modernaj Esperanto-asocioj, aŭ iĝas ilin jam nun ŝrumpi. Kaj kion diri pri la fosiliecaj LEA-oj?

Mi konkludas, ke multaj Esperanto-agadoj bazitaj sur la asocio-modelo malflusos aŭ malaperos dum la venontaj jardekoj. Ju malpli oni priploros tion, des pli oni tenos la kapon libera por elprofiti la novajn informaciteknikajn eblecojn. Maldekstra etnolingva Esperanto-informado estas jam nun afero, kiu pli bone povas baziĝi sur TTT kaj neformalaj lokaj aganto-rondoj, ol sur tradiciaj LEA-oj kun formalaj strukturoj.

SAT mem estas pli «peresperanta» ol «poresperanta» kaj do malpli tuŝita de la krizo de la «finvenkismo» (kvankam ofte «peresperanteco» kaj «poresperanteco» interkovriĝas, kiel Kep Enderby kaj aliaj konstatis). Krome, SAT havas du tradiciajn atutojn, kiuj kredeble relaŭmodiĝos: la klasbatala orientiĝo kaj la sennaciismo (de kelkaj membroj) resp. nacio-skeptikeco (de la plimulto). Sed ankaŭ ĝi – pro la kadukiĝo de la asocio-modelo – ne evitos la membraro-ŝrumpadon, eĉ se ĝi alligos al si pliajn grupojn de progresemuloj, prezentos sin pli efike kaj semos siajn ideojn pli vaste, ĝajnante per tio nekotizantajn simpatiantojn. Eble SAT iam fariĝos multe pli sukcesa politike ol nun, havante kelkcent membrojn kaj pli etan buĝeton.

RAPORTO PRI DONACIOJ

Jen raporto pri DM-donacoj en la jaroj 1998 kaj 1999, sed entute po donacinto. Pri la jaro 2000 sekvos informo venontjare.

| | |
|-------------------------------------|--------|
| Herta Bellen, Dortmund | 70,- |
| Helmut Breuninger, Ulm | 70,- |
| Friedel Bues, Hannover | 170,- |
| Regina Friedrich, Bad Pyrmont | 10,- |
| Max Hocke, München | 220,- |
| Franz Knöferl, Gerolsbach | 30,- |
| Walter Landmann, Heidelberg | 70,- |
| Johannes Meyer, Düsseldorf | 10,- |
| Karl-Ernst Paech, München | 70,- |
| Walter Poppeck, Oberkirch | 10,- |
| Hans Rodewig, Hannover | 20,- |
| Hermann Scheffler, Oberhausen | 1970,- |
| Albert Schubert, Kamen | 40,- |
| Carl-Ludwig Thies, Düsseldorf | 55,- |
| Margot Weichmann, Dortmund | 155,- |
| Willi Brandenburg, Teltge | 20,- |
| Willy Ehlers, Berlin | 10,- |
| Gottfried Hofmann, Chemnitz | 35,- |
| Michael Scherm, Welssenhorn | 35,- |
| Albert Stephan, Oberkirch | 20,- |
| Josefo Wozniczka, Eschwege | 10,- |

(Bv. permesi, ke ni donacojn sub dek gmk. ne menciis!)

Nome de la estraro kaj de la membraro mi kore dankas ĉiun donacinton, specialan amikan dankon al la kamarado Hermann SCHEFFLER, kiu en ĉiu de la multaj jaroj de lia membreco ĉiam donacis grandanman sumon; same por S.A.T.

Ni esperu, ke en la jaro 2000 kaj la sekvontaj jaroj la donacoj fontos, necesaj sumoj, kiuj krom la kotizoj helpas plenumi la asociajn taskojn kaj aktivecojn. Jam nun elkoran dankon.

Por la estraro

Albert Stephan Jiri Proskovec
(Prezidanto) (Kasrespondeculo)

HOMOJ kaj HUMANECO

✉ de leganto

Grafiti



La konata film-aktorino Gina Lollobrigida (73) pledas por drakonaj punoj de tiel-nomataj grafito-artistoj. Jam en aĝo, kiam infanoj vizitas lernejojn, la gepatroj kaj la instruistoj instruu infanojn, ke homoj respektu propraĵon de aliaj homoj, ŝi opinias.

Observi dieton

Turko, kiu pezas pli ol 270 KG, serĉas sveltan virinon por edziĝi ŝin esperante ke ŝi helpos perdi sian superpezon. La 32-jara Turko: „Mi ne jam perdis la esperon trovi maldikan virinon, kiu zorgas, ke mi persistas dieton.“ Li certigas, ke la edzino vivos ĉe li same kiel princino. *Ĉu perdo de 100 KG jam sufiĉas?*

„Mi tre ŝatas la organon de la Libera Esperanto – Asocio, do, MAGAZINO. La enhavo ĉiam estas tre interesa kaj leginda. Sed estas malfacile kompreni ĉion, kiam la gramatiko estas uzata en fajngata stilo. Mi ja nur lernis la komunan lingvon. Nu, jes helpe de mia vortaro mi provas kompreni ĉion. Alia malfacilaĵo estas, laŭ mia opinio, la multvortaj longeco de la artikoloj. Ĉu vi ne timas, ke legantoj ne interesas legi preskaŭ sciencan tekston?“
K.K.

La red.: Bedaŭrinde ofte mankas materialo, tiam artikolo por 2 aŭ pli da paĝoj, ĉiam estas konvena.

(el: Heutzutage 00.07.05.)

Ni trovis revizoron...

K.H.KERSTING, Essen, estas preta, transpreni revizoran laboron. Ni petis lin komenci ek de unua de aŭgusto, 2000. Ni dankas k-don Kersting, kiu ja dum multaj jaroj tre bone gardis nian kason. Avantaĝe estas, ke li loĝas proksime de Dortmund, kie k-do Proskovec respondecas pri la LEA/G-financoj.

Lothar NUSSBAUM, Kolonjo, estas preta subteni nian laboron laŭ siaj eblecoj. Li aktivis por LEA/G k.a. jam ek de la kvindekaj jaroj. Dankon, k-do Nussbaum!

MAGAZINO-redakcio serĉas...

Ĉiam materialon, ĉu tekstojn en Esperanto-lingvo, ĉu en la germana (ni tradukos!) Ankaŭ fotografioj estas bonvenaj, kiam estas uzebila fotokopli. Ni redonos ilin poste!

Bv. ensendi al:

Gary MICKLE
Brüsseler Str.6
13353 Berlin

Al kelkaj ekz.de MAGAZINO ni aldonis oferton de la Fritz-Hüser-Instituto! Pri la prezo bv. demandi ĉe A.F.Stephan!

13an ĝis 18an de julio 2000, Ustrzyki Górne, Pollando

KONTRAŬLIMA TENDARO

«Neniu homo estas nelaŭleĝa»

de **Lukasz Wróbel**

La liberecanan tendaron oni organizis nemalproksime de Ustrzyki Górne – vilaĝeto en montoj Bieszczady, en la sudo de Pollando, kie kontaktiĝas la limoj de tri landoj: Pollando, Ukraino kaj Slovakio. Pentrinda regiono, proksime de grandaj urboj, preskaŭ «ĉe la fino de la mondo».

Post la alveno, ni (triobla grupo de esperantistoj: Lukaso, Arek kaj Artur) renkontis dekkelkajn tendojn, ĉie nigrajn-ruĝajn flagojn, la slogantukoj kun signoj: «DEPORTADOJN STOP!», «NENIU HOMO ESTAS NELAŬLEĜA», «MALFERMI LIMOJN – FERMI REGISTAROJN!» ktp. Surloke estis jam multe da membroj kaj simpatiantoj de la Anarkiista Federacio (i.a. la sekcio de A.F. en la urbo Poznano organizis tiun tendaron). Sub ligna tegmento estis komuna kuirejo kun fumajujo. Ni pendigis nian esperantan slogantukon kun teksto: «SEN LIMOJ – NENIU LIMO ESTAS POR ĈIAM» kaj nian Esperantan verdan flagon.

La atmosfero inter homoj estis tre amika, de tempo al tempo estis interrompoj de policistoj, kiuj volis scii, pri kio ĝenerale temas – kompreneble la agado estis nelaŭleĝa en la senco de la leĝaro. La homoj senĉese alvenis kaj la tendaro estis vere interlanda – aperis anarkiistoj, punkoj kaj liberecanoj el Pollando, grupo de geanarkiistoj el Blankrusio kaj Ruslando, gastoj el Germanio, Aŭstrio, Svislando, Nederlando – la nombro de personoj estis ĉ. 150. Oni levis pli kaj pli multe da multlingvaj

slogantukoj, kiuj esprimis la reziston rilate al la landlima politiko de la Eŭropa Unio kaj la pola registaro.

La tendaro «Neniu homo estas nelaŭleĝa» elvokis interesigon de polaj radio-sendejoj kaj televido. La organizintoj (anarkiistoj de A.F. el la sekcio Poznano) faris multe da intervjuoj kaj ili klarigis la celon de nia agado.

Vespere, ĉiuj tendaranoj kolektiĝis por fiksi ĉiujn detalojn de la manifestacio planata por la sekva tago (15a de julio), sub la sidejo de la Landlima Gardistaro en Lutowiska (vilaĝo ĉ. 25 kilometrojn de nia tendaro). Komune ni fiksas la sinsekvon de agado. Intertempe, ĉie oni faris debatojn, homoj kunsidis kun anarkiistoj en Ukraino, Blankrusio kaj Ruslando, kiuj prezentis la politikan situacion en siaj landoj. Ili havis ankaŭ multege da ekzempleroj de sia liberecana gazetararo kaj oni povas diri, ke la stato de la anarkiistaj grupoj en tiuj landoj estas pli kaj pli bona.

Oni povis rigardi fotoekspozicion, kiu prezentas kulturon de *Łemkowie* (lemkoj: la etna malplimulto, kiu loĝis en Bieszczady), aŭ rigardi filmojn kun multe da anarkiistaj demonstracioj en Pollando (la kurenton ni havis de benzingeratoro). Krome oni disdonis flugfoliojn kaj senmonajn bultenojn, zinojn (sendependajn, subgrundajn magazinon) kaj aliajn liberecanajn eldonaĵojn (oni povis aĉeti librojn, kasedojn, T-ĉemizojn; oni faris ankaŭ senmone T-ĉemizojn kun la teksto «Neniu homo estas nelaŭleĝa»). La komuna vesper-

manĝo finis la sekvan, trian tagon de nia tendaro.

Sabato – la tago de la manifestacio. Ĉiuj energie prepariĝis por ĝi. Tagon pli frue oni ekzercis disrompon de policista kordono kaj aliajn teknikajn aferojn. Oni sukcesis al ni disponigi aŭtobuson, kiu alveturigis nin al la loko de la manifestacio – al Lutowiska. La horon de la agado oni fiksas je la 13.00. Ni alveturis iom pli frue, «armitaj» per la ruĝaj-nigraj kaj nigraj flagoj, slogantukoj (ni – kiel anarki-esperantistoj havis nian slogantukon kun la teksto: «SEN LIMOJ – NENIU LIMO ESTAS POR ĈIAM!»), fajfilojn, potojn, tamburojn, botelojn – farante grandegan bruon, kriegante: «AŬTORITATON FOR!», «DEPORTADOJN STOP!», «ĈIU AŬTORITATO ĜENAS NIN», «ĈIU REGPOVO – MALHELPAS VIVI», «LANDLIMA GARDISTARO AL CIVILO» ktp. Senĉese akompanis nin televiduloj kaj radioreportistoj. Policistoj estis malmultaj. En la enveturejo kelkaj k-doĵ pendigis tre grandegan, nigran slogantukon kun la vortoj: «AŬTORITATON STOP!». Ankaŭ la enveturejon oni ornamis per granda kvanto da urtikoj. Antaŭ la enveturejo de la Landlima Gardistaro du anarkiistoj tenis artefaritan laveblan barieron, kiu simbolis liman barieron. Multaj el ni disdonis flugfoliojn kaj bultenojn kun teksto pri la agado «Neniu homo estas nelaŭleĝa» kaj pri la landlima politiko diskriminanta homojn loĝantajn en la Oriento. La loka socio rilatis al la manifestaciintoj iom nevolonte (nia agado estis la unua en tiu loko). [...]

Mi persone ekkonis tre interesajn anarkiistinojn de Ukraino kaj Blankrusio, kun kiuj mi interŝanĝis – interŝanĝe kontraŭ mia magazino *LA VERBO* mi ricevis multe da ruslingva kaj blankruslingva anarkiista gazetararo kaj mi ricevis ankaŭ muzikkasedon kun anarki-

ista-esperanta bando JOMO kaj PAATOS – finnlanda anarkifeminista bando – la kanzonoj de JOMO estis eldonitaj ankaŭ en Ruslando).

[...] Oni bruligis tiun laveblan barieron kaj oni transjetis ĝin sur la terenon de la Landlima Gardistaro. Senĉese ni kriegas: «NENIU HOMO ESTAS NELAŬLEĜA» kaj aliajn diversajn kontraŭŝtatajn sloganojn. Estis bonega etoso, ĉar oni kriegis tiujn sloganojn en diversaj lingvoj: pole, slovake, angle, germane, blankruse, ukraine, ruse. Nia anarki-esperanta slogantuko estis en la avano de la manifestacio. Ni penis detrui la elveturejon al la Landlima Gardistaro, sed senefike. La agado estis filmita de kelkaj televidaj stacioj kaj ankaŭ de anarkiistoj.

La manifestacio sen pli grandaj malhelpoj flanke de la policistoj daŭris ĉ. 45 minutojn. Post la manifestacio ĉiuj aktivuloj iris al la Tendaro por preparoli la sekvontan agadon – en loko, kie kuniĝas tri limoj: pola, slovaka kaj ukraina.

Nokte komenciĝis pluvego kaj multe da homoj restis en la tendaro. Grupo de ĉ. 30 anarkiistoj iris per tre malfacila vojo (ĉ. 5 horojn en pluvego, en tre grandaj montoj). Oni mobilizis grandegan nombron de landlimaj grandistoj, do la anarkiistoj ne povis nelaŭleĝe transiri la limon (sed almenaŭ la aktivuloj paralizis la laboron de la Landlima Gardistaro).

En la posta tago nia anarki-esperanta «delegacio» devis reveni. La organizantoj projektis ankoraŭ iajn agadojn, en kiuj ni ne partoprenis.

La afero de lingvoj en la tendaro

La lingva afero en tiu tendaro estis tre interesa. Ĉar tiuloke estis multe da homoj el diversaj landoj, oni do aŭdis multe da lingvoj; dominis la pola, kaj

poste la blankrusa, ukraina kaj rusa. Mi lernis en teknikumo la rusan, do mi ne havis problemojn kun komunikado kun homoj en Blankrusio, Ruslando kaj Ukraino. Tute multe da niaj orientaj amikoj komprenis la polan. Ĝenerale mi povis senprobleme komuniki kun ili kaj mi komencis kunlaboron kun kelkaj anarkiistinoj de Blankrusio. Alia afero estis, se temas pri k-doĵ el Nederlando, Germanio, Aŭstrio, ĉu Svislando – ĝenerale ili komprenis nur la germanan aŭ anglan kaj kelkaj polaj k-doĵ senĉese tradukis el la pola en la germanan/anglan lingvon (kaj inverse) – ekzemple dum komunaj kunvenoj. Estis kelkaj personoj, kiu loĝas ekz-e en Germanio, sed bone komprenas la polan, ĉu rusan. Mi meditis pri Esperanto en la tendara

Sennaciisme pri la Proksima Oriento

de Gary Mickle

En mesaĝo de 00-10-22 al la SAT-diskutlisto Djémil Kessous skribis i.a. «Laŭ mi, sennaciistoj, pli ol aliaj, devas laŭte paroli pri tiu problemo [de la Proksima Oriento], ili havas ajojn direndajn.» Mi respondis konsente: ke utilis kompari la opiniojn de la unuopaj sennaciistoj por konstati, kiom da komunaj ajoj ili havas.

Eble la t.n. israela-palestina «pacprocezo», kiu celas kontentigi la palestinanojn per malgrandaj, ne kunligitaj teritorioj, ne estas pli promesplena vojo al solvo de la konflikto ol la fondo de «sendependaj hejmlandoj» (bantustanoj) estis bona elirvojo el la sudafrika apartejdo.

La komparo kun Sudafriko estas bona en alia rilato. Ĉe la abolo de la apartejda sistemo necesis la rezisto de la popolamasoj, sed utilis ankaŭ, ke la monda opinio taksis tiun sistemon rasisma

medio, kie estis multe da lingvaj divers-ecoj; bedaŭrinde en la «Neniu homo estas nelaŭleĝa» estis nur tri homoj, kiuj almenaŭ iom konas Esperanton. Ni diras pri Esperanto, ke ĝi povas esti grandioza solvo de la komunika problemo en tiaj tendaroj. Ĝenerale, homoj interesiĝis pri internacia lingvo (mi interŝanĝis ĉiujn ekz-ojn de *LA VERBO*, kiujn mi havis). Nuntempe, en la pola liberecana-sendependa medio pli kaj pli oni parolas/skribas pri Esperanto, multe da magazinoj kaj bultenoj volas skribi pri la lingva problemo, sed ĉio malrapide disvolviĝas, ĉar entute tio estas tute nova iniciato inter anarkiistaj agadoj. Tamen, ni esperas, ke Esperanto konstante ekzistos en la rondo de anarkiista-liberecana penso en Pollando.

(kvankam ĝi provis prezenti sin pli «etnisme» ekde la 60aj jaroj) kaj pro tio sufiĉe unusignife izoligis la reĝimon. Al la batalo kontraŭ la cionismo kaj la potencilatoj, kiujn ĝi kreis, malutilas, ke la etna naciismo estas kaj tutmonde disvastigita kaj malpli universale kondamnata ol la rasismo. Sekve, iuj landoj (kiel precipe Usono) povas pli senĝene kaj neperturbite de la interna publika opinio apogi Israelon ol en la pasinteco Sudafrikon.

Oni povus formuli unu celon de moderna sennaciismo jene: ŝanĝi la opinion-klimaton en la monda komunumo tiel, ke la etna naciismo – kio la cionismo kompreneble estas – estos tiel universale anatmata kiel hodiaŭ la rasismo. Mi konscias, ke temas pri paperecaj deklaroj, sed foje la morala efiko de tiaj deklaroj utilis por izoligi la alcelatojn ĝustatempe.

eltiraĵo el la artikolo «Etna demokratio» de Matthias Bertsch en Freitag n-ro 43 de 2000-10-20

[...] Ne nur la politikistoj apenaŭ antaŭvidis la perforton kaj la malamon, sed sciencistoj, kiuj okupiĝas pri la araba malplimulto en Israelo, estis surprizitaj de la eventoj. Ili tamen scias pri la fundamenta problemo, kiun la plimulto de israelanoj preterrigardas, ĉar ĝi ne concernas ilin: Israelo estas «etna» demokratio, kiu strukture kaj sisteme diskriminacias parton de la ŝtatanaro. Arabaj israelanoj, kiuj de kelkaj jaroj pli ofte sin nomas palestinaj israelanoj, restas ĉe la periferio.

Ilia proporcio en la tuta loĝantaro de Israelo estas hodiaŭ proksimume la sama kiel post la fondo de la ŝtato: ĉirkaŭ 18 procentoj. En 1948 preskaŭ 700 000 judoj alfrontis 156 000 arabojn, dum nuntempe la rilato estas proksimume 5 milionoj kontraŭ 1 miliono.

La ciferoj pruvas rilaton de plimulteco, sed ne la naskiĝdifekton de la ŝtato, t.e. ke ĝi sub la ekzistantaj cirkonstancoj volas esti samtempe juda kaj demokratia. Estiĝinta en la batalo kontraŭ la araba ĉirkaŭaĵo, Israelo alprenis kiel ŝtatanon tiun araban malplimulton, kiu nek fuĝis nek estis forpelita dum la milito de sendependiĝo – sen fari el ili egalvalorajn civitanojn. La arabaj israelanoj, kvankam ili havas israelan pasporton, ne havas israelan naciecon. Tiu ne ekzistas, sed nur «judoj», «araboj» kaj «druzoj» – kaj tio estas en la politiko de Israelo la decida kategorio.

Por firmigi la judan karakteron de la ŝtato, la plej granda parto de la terenoj, kiuj troviĝis en araba posedo, estis prenitaj de la proprietantoj kaj ŝtatigitaj – hodiaŭ pli ol 90% de la israela teritorio troviĝas en ŝtata posedo. La farmigado de tiuj ŝtataj terenoj al nejudoj estas

malpermesata per kontrakto inter la *Jewish National Fund* kaj la *Israel Land Administration*. Unu el la sekvoj: konstru-permesilojn por pligrandigi siajn vilaĝojn aŭ urbojn oni rifuzas al arabaj israelanoj same tiel regule kiel oni al-lasas la etendiĝon de judaj setlejoj en sia tuja najbareco.

Similan «etnan» demografian funkcion plenumas ankaŭ la Leĝo de Reveno envivigita en 1951 de la Kneseto, surbaze de kiu ĉiu judo rajtas tuj ricevi la israelan ŝtatancon. Tiu iama konsekvenco de la amara sperto, ke dum la naciismo apenaŭ iu lando akceptis fuĝantajn judojn, ankoraŭ hodiaŭ estas utiligata en Israelo kiel instrumento de loĝantarpolitiko, kiu celas kompensi la pli altan naskokvoton de la araba malplimulto. Tial oni laŭcele setligis la enmigrintajn rusajn judojn (ekde 1990 proksimume miliono) en la nordo de Israelo por rompi la tiean araban plimulton en la loĝantaro. Kun sukceso, kiel la prezidanto de la *Jewish Agency* anoncis en decembro de 1992.

Ankaŭ sur aliaj kampoj de la politiko la neegala traktado estas evidenta: arabaj israelanoj estas ne nur ekskluditaj de la armeo – centra institucio por kari-ero en Israelo – sed ankaŭ el aliaj sektoroj de sekureco. En la ministerio de edukado oni elspezas por araba infano nur duonon de tio, kion oni elspezas por juda.

Precipe klara la diskriminacio de la araba plimulto fariĝis en 1985, kiam la Kneseto envivigis fundamentan leĝon pri parlamentaj elektoj. Tiu malpermesas ĉiujn kandidato-listojn, kiu eksplicite aŭ implicite neas Israelon kiel ŝtaton de la juda popolo. Arabaj deputitoj pledas ek de tiu tempo por tio, ke oni parolu nur pri la ekzisto de Israelo aŭ menciu apud la juda popolo ankaŭ la arabajn ŝtatanon – ĝis nun sensukcese.

Lingvaj problemoj en la maldekstra gazetaro

el la artikolo «Sozialstandards als Randthema» (Socialaj normoj kiel ĉeranda temo) de Hans Ulrich en *Junge Welt* (sekcio «Eksterlando») de 2000-10-13, rete: <http://www.jungewelt.de/10-13/005.shtml>

Kiam la estroj de ŝtatoj kaj registaroj de la 15 ŝtatoj-membroj de la Eŭropa Unio renkontiĝos la hodiaŭan vendredon kaj sabate en la franca Biarritz, oni okupiĝos interalie pri temo, kiu longe vegetis en la ombroj – la Eŭropa Ĉarto de Bazaj Rajtoj. Komence de decembro la EU-pintkonferenco en Nico laŭplane donos sian benon al tiu kolekto de politikaj kaj socialaj bazaj rajtoj. [...]

Guste la mankanta jura devontigeo kaj la regresigo de la ekonomiaj kaj socialaj rajtoj estas kritikataj de la neregistraj organizaĵoj (NRO-oj), kiuj estis dekomence entiritaj en la diskutado pri la Ĉarto. La diskutpartopreno estas fakto, kiun ankaŭ la manaĝanto de la Eŭropa Domo de la federacia lando Brandenburgio, Horst Grützke, taksas «principe pozitiva». Liajn suplementajn proponojn por pli forta sociala elkonstruo de la Ĉarto la Asocio komune kun aliaj eŭropaj NRO-oj jam printempe transsendis al la kunveno – tamen ili malsukcesis eniri la malneton.

La organizaĵoj profitis la fakton, ke ili jam delonge okupiĝis pri la Ĉarto de Bazaj Rajtoj. Tiusece la «Konstanta Forumo de la Civila Socio», asociiĝo de neŝtataj organizaĵoj kaj movadoj laboras jam de 1996 je la ellaboro de eŭropa «konstitucio», kiu fiksas la politikajn, ekonomiajn kaj socialajn rajtojn kiel kompleksojn. Sed konfliktoj pri la gvidanteco en la «movado de bazaj rajtoj» kaj la supersarĝo de la Ĉarto per postrangaj temoj – ekzemple la akcelado

de «ekzotikaj» lingvoj kiel Esperanto – intertempe kondukis al tio, ke la voĉo de la NRO-oj estas apenaŭ plu perceptebla en la debato. Tamen, la NRO-oj denove kolektiĝos en Nico paralele al la «oficiala» pintkonferenco por interkonsiliĝi pri la plua procedado rilate al la Ĉarto de Bazaj Rajtoj. [...]

el la legantoletero de Walter Klag, Vieno, kiu reagis en la eldono de *Junge Welt* de 2000-10-17 je tio,

rete: <http://www.jungewelt.de/10-17/021.shtml>

Via mencio pri la «akcelado de ekzotikaj lingvoj kiel Esperanto» estas nekomprenebla al mi. La Universala Esperanto-Asocio estas unu el la NRO-oj (neŝtataj organizaĵoj) jam delonge reprezentataj ĉe la tri UNO-sidejoj. Krome, Esperanto estas kiel komuna dua lingvo la plej bona solvo de la lingva problemoj.

(Ni eksciis pri la artikolo per mesaĝo de Ulrich Matthias en soc.culture.esperanto.)

La LEA/G-Magazino en interreto:
<http://home.germany.net/101/121591/leag/>

novaĵoj

Zofia Banet-Fornalowa: La familio Zamenhof

Jus aperis ĉe Kooperativo de Literatura Foiro nova libro de la konata Esperanto-aŭtorino, ĉi-foje biografia studo, minejo de ĝis nun nepublikigitaj informoj pri la familianoj de Zamenhof. Ĝi liveras fonajn informojn pri la medio, en kiu Zamenhof naskiĝis kaj vivis, pri la familio, kiu apartenis al la plej progresema parto de la socio, klerisma kaj aperta al la mondo, kiu apogis plenkore lian homaranisman idealon kaj kiu plejparte pereis dum la Holokaŭsto. (GM)

Jakvo Schram: Naciismo, internaciismo, sennaciismo

Jen la titolo de prelego (subtitolita «Pensoj de strat-filozofoj»), kiun Jakvo Schram, redaktoro de *Liberecana Ligilo*, prezentos 2000-12-08 dum la Faulhaber-semajfino. Jam nun la prelego aperis broŝurforme kiel eldonaĵo de la Progresema Esperanto-Forumo. La aŭtoro radikale kritikas la naciismon kaj plurajn ĝiajn ideajn bazojn. Adreso: Jacques Schram, Hof Ter Bekestraat 49, BE-2018 Antwerpen, <j.schram@skynet.be> (GM)

LETEROJ AL LA REDAKCIO



skribas Sebastian Hartwig, Berlino (00-06-09):

La nova *Magazino* bonorde atingis min. Mi volas gratuli al vi pro ĝi. Ĝi estas certe unu el la plej interesaj numeroj ĝis nun. Tamen, kial vi elektis tiun vortan monstraĵon "etnofilia"? La nova radiko "fili-" kun signifo de "em-" estas ne necesa. Krome "filio" jam havas alian signifon. En Okcidentalo mi certe uzus "ethnophilie", sed tia vorto malbone alsimiligas sin al la spirito de Esperanto.

skribas Jakvo Schram, Antverpeno (00-07-03):

Denove mi legis vian tekston pri «Ĉu etnofiliokritika...». Al mi ege plaĉas la teksto, kiu aperis al mi kiel la unua teksto, kiu montras ke la sennaciismo de Lanti havas valoron, konsideranta ĝin moderna formo kontraŭ la (dektremega) naciismo, kiu alportas al la homoj nur mizeron. Mi esperas (kaj mi ĉiam faras, legante seriozan tekston) ke ĝi ekstartos profundan debaton, kiu reviviglas la pensojn de Lanti, sed en moderna versio.

Nova studenta grupo en Berlino

2000-10-29 okazis fonda kunveno de BSE (Berlinaj Studentoj-Esperantistoj) en la «A-Laden». Oni decidis renkontiĝi ĉe la kontraŭrasisma manifestacio de la 9a de novembro (organizita de praktike ĉiuj partioj) kaj invitis aliajn berlinajn esperantistojn partopreni. Estontaj kunvenoj traktos i.a. la historion de la laborista Esperanto-movado. (SH)

skribas Willi Firth, Berlino (00-06-09):

Sebastiano skribis: "Mi volas gratuli al vi pro ĝi [=la *Magazino*]. Ĝi estas certe unu el la plej interesaj numeroj ĝis nun." Mi samopinias. Bonegas, ekzemple, kiel la dubindan artikolon de Albert Stephan pri financrimedoj vi sekvigis per la artikolo de Bociort, kiu emfazas la gravecon de nemateriaj faktoroj. Tio plaĉis al mi.

skribas Jozefo (kaj Irene) Wozniczka, Eschwege (00-07-20):

Mi estas ano de LEA/G kaj fervora leganto de ties *Magazino*. Mi tute apogas vian lastan artikolon pri la etna identeco, ĉar mia ja mem spertis tion. Naskiĝinte en Pollando de pola Patro kaj germana Patrino mi estis ek de la lulilo dulingvano. [...] Do al kiu etno mi apartenas? Mi estas licenca radioamatoro kaj ĉiutage interparolas skribe tra t. n. paketradio kun radioamatoroj kaj esperantistoj en la tuta mondo. Elkore salutas vin Jozefo kaj Irene Wozniczka el Eschwege ĉe Kassel.

Weltsprache ma-ma-da-da

Rührende Familienszene in Neuseeland. Zum ersten Mal formuliert der zehn Monate alte Sohn eines Maori-Häuptlings ein klar verständliches Wort – „Mama“.

Wie bitte, ein Maori-Baby sagt „Mama“? Sprechen denn diese Ureinwohner Deutsch?

Natürlich nicht. Aber alle Babys dieser Welt haben exakt gleichen Wortschatz. Mama, Dada, Gogo und Lala – eine Weltsprache rund um den Globus.

Dass Kleinkinder beim ersten Plappern quasi mit einer Zunge reden, egal ob bei uns, in Japan, in der afrikanischen Steppe oder in Grönland, haben die Sprachforscher Barbara Davis und Peter MacNeilage von der Uni Austin (Texas) entdeckt. Ihre Erkenntnisse: Babys folgen bei ihren ersten Wortbildungen immer dem gleichen Schema.

Mama, Dada, Gogo, Lala – jedes Mal folgt auf einen Mitlaut ein Vokal. Aber warum? Die simple Erklärung: Das Baby macht es sich einfach. Es brabbelt mit geschlossenem Mund los, also mit einem Mitlaut – erst automatisch folgt ein Vokal.

Erst mit etwa einem Jahr werden die Babys dieser Welt vielsprachig: Sie übernehmen langsam die Sprache der Erwachsenen. Jetzt nennt der Häuptlingssohn seine Mutter nicht mehr „Mama“, sondern korrekt nach Maori-Art „Koka“.

Eine Wissenschaftlerin des Hamburger Werner-Otto-Instituts (dort werden Stimm- und Sprachtherapeuten ausgebildet): „Interessanterweise ist dieses Sprachschema auch bei gehörlosen Kleinstkindern vorhanden. Babys also, die keine Worte nachahmen können. Der Beweis dafür, dass diese weltumspannende Baby-Sprache in unseren Erbanlagen vorgegeben sein muss.“

Schon Kaiser Friedrich II (1194-1250) erhoffte sich von Babys Aufschluss über eine „Ursprache“. Er liess Neugeborene in Einzelhaft sperren, um herauszufinden, ob sie in völliger Isolierung Sprache entwickeln würden. *Ein grausames Experiment: Alle Babys starben.*

(aus Bild 4.5.00 v. Astrid Sievert)

Monda lingvo ma-ma-da-da

Kortusa familia sceno en Nov-Zelando. La unuan fojon la dek-monatoj-aĝa filo de la Maori-tribestro formulas klare kompreneblan vorton – „Mama“.

Ĉu vere, ke bebo diras „Mama“? Ĉu tiuj praloĝantoj scipovas la germanan?

Kompreneble ne. Sed ĉiuj beboj en la mondo havas ekzakt' la saman vorttresoron. Mama, Dada, Gogo kaj Lala – monda lingvo ĉie sur la globo.

La lingvoesploristoj Barbara Davis kaj Peter MacNeilage de la universitato Aŭstin (Teksas) esploris, ke beboj parolas fakte per unu lingvo, ĉu en Germanio, ĉu en Japanio, ĉu en Afriko ĉu en Grenlando. La kompreno de ambaŭ: Beboj havas ĉiam la saman skemon formi la unuajn vortojn.

Mama, dada, gogo, lala – ĉiam konsonanton sekvas vokalo.

Sed kial? La simpla klarigo: La bebo simpligas, la sonoj – estas konsonantoj – sonas el fermita buŝo, do, aŭtomate sekvas vokalo.

En aĝo pri unu jaro la beboj en la mondo iĝas multlingvantoj. Ili malrapide transprenas la parolmanieron de la plenkreskuloj. Ek de tiu tempo la filo de la tribestro nomas sian patrinon ne plu „Mama“, sed korekte laŭ Maori-lingvo „Koka“.

Scientistino de la Werner-Otto-Instituto en Hamburg, kie oni edukas voĉ- kaj lingvo-terapeutojn, informis: „Estas interesa, ke ĉi tiu lingva skemo ekzistas ankaŭ ĉe surdaj beboj, kiuj ja fakte ne povas imiti vortojn. Argumento pri tio, ke tiu monda beba lingvo sin trovas certe jam en nia genetiko.“

Jam la imperiestro Frederiko la dua (1194-1250) esperis ricevi sciligojn pri ebla pralingvo; li zorgis, ke beboj estis enŝlosataj tute sole por ek trovi, ĉu la beboj evoluigus lingvon, kiam en plena izolado.

Kruela eksperimento: Ĉiuj beboj mortis!

Tradukis k. kompilis: Štefano

>> Pli taŭga estas, kiam infanoj komencas se eblas, ĝustatempe lerni la Internacian Linvon Esperanto!

INTERNACIA AMIKECO

DEZIRAS KORESPONDI...

Eva-Zsuzsana SOFINETI (dentkuracisto)
Transilvaniei 2A ap.18
RO-4800 Baia Mare (Romanio)
Tel: 0040-064-439057
> *1942, parolas Esp., la hungaran, anglan, Germanan lingvojn. HOBIO: psikologio
INTERESAJ: korespondamikecoj, turismo, vojaĝoj.

☆☆☆

Valentin MARTINEZ (funkciulo)
Martin Blasi 64 1° 1a
ES-00905 L'Hospitalet
> *1953, parolas Esp., katalan
INTERESO: korespondamikecoj

☆☆☆

El revuo „l'esperanto“ (Italio)

Claudia WROBEL
Wildparkstr.46
DE 16225 Eberswalde (Germanio)
> 15j., INTERESAS korespondi
prefere kun samaĝaj ge-esp-istoj

Karla BARTOVÁ (vendistino)
Svojsikova 757, CR-47-301 Novy Bor
Ĉeĥio
> *1954, parolas krom Esp. la polan, germanan, rusan k. anglan lingvojn.
HOBIO: kolektado de telefonkartoj
INTERESAJ: korespondamikecoj

Kai-Shen YAO (eduka inspektoro)
23 Huancheng beilu
CH-224 001 Yancheng (Ĉina Resp.)
> *1939, parolas Esp., ĉinan
HOBIO: esperantismo
INTERESAJ: korespondado por sincera amikeco kun geamikoj, vizito reciproke

Luisa VAROTTO (studentino)
Via Ponterotto 34, IT-35010 Limena (PA)
Italio
> 22j., studas politikaj sciencoj,
Esperanto-komencantino

OK bildpoŝtkartoj pri la kultura historio de la Esperanta Movado estas haveblaj kontraŭ 8 IRK ĉe:

*A.F. Stephan, Renchener Str.47
DE-77704 Oberkirch (Baden)
Tel+faks: (0)7802 – 90 336*

PRESKAŬ NE KREDEBLA...

retiriĝo post la geedziga soleno. Ĉu problemoj? La katolika klerikaro en USONO estas grandanima. La diocezo en la US-ŝtato Michigan tenas la mondan rekordon pri nuligitaj edzeco: Tie la eklezio deklaras malvalide preskaŭ 75 % de la geedzigoj sed rezignas pri la pruzo de ĉ.250 \$, ĉar la ĉefepiskopo Szoka timas perdi kredantojn.
(el: Ruzgazeto Dortmund)

AKTIVULO Geo JUNIER forlasis ĉi tiun mondon

Mi – Margot Stephan - fariĝis konata al Geo kaj lia afabla edzino, kiam la Esperanto-Grupo Oberkirch aktivigis grup-gemelon kun la Esperanto-Grupo Gray (Haute-Saône) en la sepdekaj jaroj. Ek de tiam estas fleĝitaj interesaj kontaktoj ĉu en Gray ĉu en Oberkirch.

Francaj esperantistoj kaj Esperanto-grupoj i.a. la LIBERA ESPERANTO-ASOCIO il-veris kaj certe daŭre liveros gazetojn, fotojn kaj aliajn aĵojn el la Esperanta Mondo al la muzeo, kion Geo kolektis, arkivis kaj prezentis. „Sia“ muzeo kaj Gray valoras viziti.

Al la edzino kaj la familianoj ni esprimas nian kondolencan.

Margot kaj Albert Stephan

En la organo de SAT-Amikaro nro. 551 ni legis jenan nekrologon:

„Géo JUNIER mortis la 17-an de februaro 2000.

En Pasko 1999, la partoprenantoj en la 54-a SAT-Amikara Kongreso, kiu estiĝis en vilaĝo Glay (departemento Doubs), honoris lin konsidere lian gravan kontribuadon al la ekzistado de Esperanto, al kiu li dediĉis grandan parton de sia vivo.

Géo Junier naskiĝis, la 22-an de majo 1913, en urbeto Fleuriel (departem. Allier).

Dum sia tuta profesia vivo (Li estis faka laborkontrolisto ĉe la fervojistoj) kaj post sia emeritiĝo en la jaro 1973, li kolektis ĉiajn esperantajojn, kiujn li atenteme konservis. Dank' tiun konservadon, en la jaro 1986 povis fondiĝi samtempe en urbo Gray (departemento Haute-Saône) Kultura Centro Esperantista kaj Nacia Esperanto-Muzeo; aparte menciinda estas la fakto, ke la tiea urbeŝtaro senpage disponigis deksalonan etaĝon profite por la N.E.-Muzeo.

Eklerninte la Internacian Lingvon en la jaro 1932, Géo Junier ricevis diplomon pri Esperanto (ateston pri lernado) en la jaro 1937. Ek de la jaro 1945 li instruis la lingvon en urbo Gray. Tiam fondiĝis la Esperanto-grupo de urboj Gray kaj Arc-les-Gray. Géo fariĝis delegito de UEA pri Turismo.

Krome, pro sia por-Esperanta agado J. fariĝis en la jaro 1969 kavaliro de Palmordeno. Li akiris diversajn honormedalojn de urboj, kun kies estraroj li estis en rilato sur la kampo de la Esperanto-agado. En la jaro 1987 li ricevis la oran medalon pro Bonvolaj Servoj. En la jaro 1988 li ricevis la bronзан medalon de la Turismaj Oficejoj. 1989 la Franca Akademio kronis lian por-Esperantan agadon per atribuo de ora stelo.

Géo Junier lasos en nia kolektiva memoro la jenajn trajtojn: sinoferon, servopretecon, persistecon, humuron. Mirindas la fakto, ke gravaj instancoj agnoskis per premioj lian Esperantistecon, dum ili daŭre Ignoras Esperanton. Ni esperu, ke la Esperantajoj, kiujn Géo Junier arigis en „sian“ muzeon, utilos por la disvolviĝo de la Internacia Lingvo, kaj ke ili ne falos en forgeson.

Ni kondolencas la familianojn kaj parencojn.

Roland Cuenot

☆☆☆

SAT-AMIKARA KONGRESO

Ĉar en la jaro 2001 ne estos ebla aranĝi LEA/G-kongreson, ni rekomendas partoprenon en la kongreso de SAT-Amikaro.

Ĝi okazos paskon venontjare en la urbo Chambéry en Savojo, aranĝota de la asocio Espéranto Vive.

Pri detaloj ni informos ĝustatempe en ĉi tiu jaro.

AFS

☆☆☆

Kataloga broŝuro pri la Esperantomovado (ek de 1911) havebla kontraŭ nur dek (10) gmk. ĉe: A.F.Stephan, Renchener Str.47, (DE) 77704 Oberkirch (Baden)

Broŝuroj de Maldekstra Forumo Berlino: Esperantistische Weltbilder* de Wojciech Usakiewicz (3a parto)

Jen eltiraĵo el la unua broŝuro de la serio *Esperanto und das internationale Sprachproblem*. Ni prezentas ĉi tie la trian kaj lastan parton, kiu pritraktas la idearon prezentitan de Sándor Szathmári en sia romano *Vojaĝo al Kazohinio*.

- En la pli temspecifa serio *Esperanto und das internationale Sprachproblem* aperis ĝis nun ĉi tiu kaj du pliaj broŝuroj: *Lazarus Ludwig Zamenhof* de Gaston Waringhien (kun *Brief über die Entstehung des Esperanto* de Zamenhof) kaj *Esperanto und Anarchismus* de Will Firth. La broŝurojn de ĉi tiu serio ni ĝis nun vendas po DM 1,20.
- En la pli ĝeneralinforma info-serio aperis ĝis nun *Was ist Esperanto? Wozu Esperanto?* kaj *Eine andere Kommunikationsidee: Esperanto*. Ilin ni vendas po DM 0,80.

La teksto de la broŝuro estas eltiraĵo el Usakiewicz, Wojciech: *Esperancja – Kultura i kulturotwórcze mechanizmy*, Instytut Kultury, Warschau 1989, S. 71-101; tradukita de Gary Mickle. La teksto estis eldonita kun la afabla permeso de la aŭtoro.

Das Kasohinien von S. Szathmári

1958 erschien auf dem Esperanto-Buchmarkt das 20 Jahre zuvor verfaßte Buch *Vojaĝo al Kazohinio* (Reise nach Kasohinien) von Sándor Szathmári. Der Einfall des Verfassers bestand in der Versetzung des Swift'schen Gullivers in ein durch perfekte Rationalisten und perfekte Irrationalisten bewohntes Land. *Vojaĝo al Kazohinio*



Sándor Szathmári
(1897-1974)

verdient Beachtung als Gesellschaftsmodell, dessen Einzelheiten manchmal ein ähnliches

Schmunzeln hervorrufen können wie die Bücher Jules Vernes, aber bei dem in erster Linie die Konsequenzen des Beschriebenen zu denken geben.

Kasohinien ist durch drei Bevölkerungsgruppen bewohnt: Hinen, Behinen und Belohinen. Grundlage der gesunden Gesellschaft sind die Hinen; die Behinen werden als Unnormale isoliert, während die Belohinen mit dem Status von Lernenden (also mit dem Recht auf systemfremdes Verhalten) unter den Hinen leben. Die Lebensordnung der Hinen stützt sich auf den Begriffen des *kazo* bzw. *kazi*, die angeboren sind und ethische, rechtliche und Verwaltungssysteme ersetzen. Eigentlich ist der Terminus „Gesellschaft“ in Bezug auf die Hinen nicht angebracht, da der Begriff des *kazo* die Schaffung jeglicher Gruppenbindung ausschließt. Das *kazo* regelt das Verhalten eines Hinen in ausreichender Weise. Ein nicht nach dem *kazo* handelnder

Hine ist ein Behine. Vorausgesetzt, daß wir die „Gesellschaft“ der Hinen als System ansehen, kann die Regel des *kazo* als Prinzip der höchsten Systemeffizienz, d.h. der Maximierung der Tätigkeitswirkung bei Minimierung des Energieaufwands, definiert werden. „Nehmen wir an, es sitzt jemand auf einem Gartenstuhl und es gibt keinen anderen freien Platz. Ein Anderer kommt vorbei und bittet, den Platz zu räumen, aber der Sitzende weigert sich. Die Weigerung ist *kazo*, sofern der Sitzende sehr müde ist, anderenfalls ist sie *kazi*.“²⁸ Gulliver, der über keinen angeborenen Regulierungsmechanismus verfügt, findet sich in diesem System offensichtlich nicht zurecht (er funktioniert in ihm wie ein Belohine):

„Ich fragte Zatomon, wie er es schafft, verschiedene Fälle des *kazi* zu vermeiden.

‘Ein *kazo*-Mensch macht nur *kazo*-Sachen,’ antwortete er.

‘Mir scheint,’ sagte ich, ‘daß du meine Frage nicht verstanden hast. Woher weiß der, der sich setzen will, daß er der Müdeste ist?’

Er schaute mich verwundert an. ‘Wenn er um den Platz bittet, muß er der Müdeste sein.’

‘Aber woher weiß er das?’

‘Weil das *kazo* so ist!’

Ich hatte schon erkannt, daß wir einander nicht verstehen. ‘Aber wie kann er in den Kopf des Anderen hineinblicken?’

‘Ich sagte schon,’ antwortete er, ‘daß das *kazo* eben so ist. Es gibt zum Beispiel eine bestimmte Ameisenart. Wenn eine von ihnen Honig findet, saugt sie sich mit der Süßigkeit voll. Trifft sie danach eine andere Ameise, die keinen Honig gefunden hat und mehr Hunger hat als sie, dann fügen sie ihre Mäuler aneinander, und die satte Ameise gibt der hungrigen soviel Honig ab, daß sie nachher gleich satt sind. Woher weiß denn die satte Ameise, daß die andere hungriger ist, und woher wissen beide, wann sie gleich satt sind?’

‘Na ja, woher denn?’ fragte ich mit heftiger Neugier, da ich mir von ihrer vollkommenen Wissenschaft die Enthüllung von Geheimnissen erhoffte, die bei uns noch als ungelöste Fragen der Natur gelten.

‘Daher, daß die Satte der Hungrigen Honig abgibt, und sie dann im gleichen Maß satt sind, als sie auseinandergehen.’²⁹

Im System der Hinen gibt es keine abstrakten Begriffe und keine anderen symbolischen Systeme als die in der Sprache enthaltenen. Deshalb ist die Übersetzung vieler Begriffe aus den europäischen Sprachen in die hinische Sprache unmöglich. Vergebens versucht Gulliver, den Hinen Kenntnisse über die Musik zu vermitteln:

„Meine Hand in Richtung des Mondes hinausstreckend, begann ich, mit geschlossenen Augen und leise die Barkarole von Offenbach zu singen.

Nicht einmal zwei oder drei Takte konnte ich singen. Zolema unterbrach mich aufgeregt:

‘Fühlst du dich schlecht?’

‘Nein. Ich singe.’

‘Was ist das?’

Ich war wieder durcheinandergebracht. Sogar *das* mußte ich erklären. Aber in ihnen war vielleicht doch der Sinn für das Schöne und das Edle vorhanden, nur *sie* kannte Beides nicht und hatte nicht einmal davon gehört. Würde es mir gelingen, eine Seele aus der Wüste zu retten und sie für mich zu gewinnen?

Ich fing an, das Wesen des Gesangs zu erläutern. Ich nahm die chromatische Tonleiter als Ausgangspunkt.

Sie konnte nicht begreifen, welchen Sinn das Ganze habe, und weshalb wir nur solche Töne als musikalisch bezeichnen, die nach ihren Schwingungszahlen bestimmte Beziehungen zueinander eingehen, und wozu eine solche Unterscheidung von Tönen notwendig sei.

Und am Ende, als sie die Struktur der Musik verstanden hatte, rief sie:

‘Aber das gibt es doch gar nicht!’

Genau das war eine allgemeine Antwort bei ihnen. Sie konnte nicht verstehen, warum wir Nichtexistierendes (in diesem Fall die Tonleiter) in die Wirklichkeit umsetzen, nur um daraus anschließend etwas Anderes hervorzubringen.

[...]

Über die Tonleiter meinte sie, sie sei wie der Anbau von Obst seiner Farbe zuliebe, oder das Vorhaben, Sonnenstrahlen zu schmecken. Die Stimme diene dazu, unsere Gedanken zu übermitteln und nicht dazu, unbegründbare Systeme zusammenzustückeln, die wir zur Grundlage nehmen, um noch eine weitere nichtexistierende Etage draufzusetzen: die Musik, mit der wir uns mühevoll beschäftigen, wobei wir diskutieren, ob die behandelte Musikkomposition den von uns selbst erfundenen Regeln entspricht, die nicht einmal eine wirkliche Existenz haben, weil sie nur ausgedacht sind.

Geduldig ließ ich sie reden, da sie noch gar nichts von der Sache wußte. Wieder begann ich mit meiner schönen Erbauungsarbeit. Ich erzählte über Musikinstrumente. Das von der Geige hörte sie sich noch an, aber schon bei der Trompete machte sie die Bemerkung, daß wir wohl die lärmdämpfenden Töpfe nicht kennen, die sogar den ohrenzerreißendsten Lärm bis zur Erträglichkeit abschwächen.

Ich war also wieder am Anfang. Jetzt mußte ich erklären, daß wir *absichtlich* musizieren, was ihr sehr schwer in den Kopf ging. Als sie es endlich verstanden hatte, fiel sie in ein tiefes Nachdenken.

‘Also, reicht denn nicht der Maschinenlärm in den Fabriken, so daß ihr noch zusätzliche besondere Lärmmaschinen betreiben müßt?’

Ich stellte fest, daß man nicht in Fabriken Musik macht, sondern nach der Arbeit, daß

in ruhigen Parkanlagen z.B. ein Platzorchester spielt, dessen verträumte Melodien das Herz erquicken.

Das wollte sie absolut nicht glauben. Sie sagte, es sei Barbarei, die Ruhe in einem Park durch Lärmmaschinen zu zerstören, genauso, als wenn man zwischen den Sträuchern an einem Spazierweg raucherzeugende Maschinen aufstellte, statt sich der guten Luft zu erfreuen.³⁰

Im Begriffssystem der Hinen umfaßt die Kategorie des *kazi* nicht nur selbstzweckhafte Tätigkeiten und ihre Ergebnisse, sondern auch alle irrationalen Tätigkeiten (z.B. nicht vollständig produktive Arbeit, oder der Bezug von Gütern, die nicht der Befriedigung des physiologisch verstandenen Lebensbedarfs dienen). *Kazi* ist auch die Neugier, die nicht zum Erwerb von notwendigem Wissen führt. Die Hinen beantworten also ausschließlich Fragen von Belohinen (die besondere, auf den jeweiligen Status hinweisende Abzeichen haben). Darüber hinaus führen sie keine Gespräche. In ihrer Gesellschaft gibt es keine Verbote. Der Inhalt des Schildes „Rasen betreten verboten!“ lautet „Betreten des Rasens ist nicht nützlich“.

Die Hinen sind uniformiert, was Bekleidung und Frisur (eine Glatze) betrifft, und sie haben einheitlich gestaltete und ausgestattete Wohnungen. Es gibt bei ihnen weder den Begriff des Eigentums noch ein Wirtschaftssystem. Notwendige Güter werden aus allgemein zugänglichen Lagern bezogen. Auch die Güterverteilung wird durch das Prinzip des *kazo* regiert. Als Gulliver eine Wohnung in der Nähe seines Arbeitsplatzes sucht, geht er so vor: „Ich ging zum nächstgelegenen Haus und ohne jede Einleitung sagte ich dem dort wohnenden Hinen:

‘Ich will hier wohnen. Zieh aus!’ (Stellt Euch, meine werten Leser, so etwas in Europa vor! Aber ich wußte, daß sie Ord-

nung nicht kennen, worauf ich meine Berechnungen gründete und dabei nicht falsch lag.)

Der Hine hat nämlich, ohne jegliche Überraschung oder Belcidigtsein, einfach gefragt:

'Warum?'

'Weil ich hier nebenan in der Textilfabrik arbeite, und diese Wohnung ist für mich näher dazu.'

Der Hine sagte, daß er drei Straßen weiter in einer Kantine arbeite, worauf er meinen Vorschlag *kazo* fand, sich erhob, die Wohnung übergab und ging weg, um drei Straßen weiter in derselben lakonischen und einfachen Weise einen anderen aus dessen Wohnung zu entfernen.³¹

Der Europäer, mit einem angeborenen *kazo*-Gefühl nicht ausgestattet, kann sich der Hinenwelt nicht anpassen. Gulliver bittet also um Überführung in das abgetrennte Gebiet der Behinen, die sich nach Meinung der Hinen ausschließlich mit nichtexistierenden Dingen beschäftigen. Die Welt der Behinen ist ein geschlossenes symbolisches System, das sich auf Grundbegriffen stützt, die dem Hinen (aber auch dem Europäer) unverständlich sind. Gullivers Ankunft bei den Behinen sieht folgendermaßen aus:

„Jemand saß auf einem Bank und las ein Buch. Nach kurzem Zögern sprach ich ihn an: 'Stört es dich, wenn ich was frage?'

Dieser berührte seine Nase mit dem Finger und sagte: 'Pritz-prutz', woraufhin er lächelte.

[...]

'Ich wurde gerade hierher gebracht', sagte ich hilfeersuchend. 'Ich bin unerfahren. Ich bitte, antworte mir. Warum sagst du *pritz-prutz* und drehst dich um?'

Plötzlich erweichend, wand er sich mir zu. 'Ach! Das wußte ich nicht. Dann ist das ein ganz anderer Fall. Ich verstehe. Also werde ich es dir beibringen. *Pritz-prutz* ist *belki*'

'Was?' fragte ich verschämt.

'*Belki*', antwortete er ohne Zögern, während ich verstohlen nach einer Fluchtmöglichkeit schaute. 'Das verstehst du ja nicht, weil du nicht weißt, was das *ketni* ist.'

'*Ketni*?'

'*Ketni*. Wenn man *pritz-prutz* sagt, mußt du damit antworten und dabei den Finger auf die Nase legen, und das ist das *belki*. Und das *belki* ist *ketni*. Wenn du das nicht machst, benimmst du dich nicht *ketni*-haft, und man wird sich über dich natürlich *enoieren*.'³²

